

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 650, 1976.03.24 & 27

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian prelegaron pri la peresperanta instruado de la franca lingvo.

A.- Tuj kiam la gelernantoj akiris la fundamentajn konojn pri la vortformado kaj pri la konjugacio de esperanto, oni povas transiri al la ekstudo de beletraj tekstoj. Kaj lernante traduki kelkajn el tiuj ĉi tekstoj en la francan, la gelernantoj samtempe lernas verki en sia nacia lingvo.

Cl.- Sed oni neniam tradukigu tekston, kiu ne estis antaŭe detalege analizita laŭ diversaj vidpunktoj : vortfarado, gramatiko, signifo, karakterizaj ecoj, stilo, ktp. La venontan semajnon ni donos ideon pri tiuj ĉi ekzercoj. Hodiaŭ ni unue legos al vi fablojn de Kolomano Kalocsay, kiuj montriĝis tre efikaj por la instruado de esperanto.

A.- La verko **Ezopa Saĝo** de Kolomano Kalocsay estas minejo de facile alireblaj poemetoj, kiujn la infanoj treege aprezas. La lingvaĵo estas ĝenerale simpla, sed tamen tre varia. La simbolaro estas sen tro da peno komprenebla, kaj ĝi konservis plenan aktualecon.

Cl.- Oni neniam transiru al la traduketapo en la laboro, antaŭ ol la originalaĵoj estos fariĝintaj familiaraj al la infanoj. Ili unue parkeru ilin, komparu ilin, ekŝatu ilin. Poste ili provu ilin reverki en alia lingvo, kiel ekzemple en la franca. Tiam iliaj tradukaĵoj estos multe pli kontentigaj, ol se oni sin tuj ĵetus en traduk-ekzercojn, antaŭ ol la asimilado de la lingvaĵo estas akirita. Tro ofte en la lingvo-instruado oni neglektas tiun ĉi tamen fundamentan labor-etapon.

A.- Jen eta antologio de fabloj de Kolomano Kalocsay, kiujn oni povas konsideri kiel enkondukon al la esperanta beletro. La unua teksto, kiun ni konsilas studi estas : **Nur unu, sed...**

Cl.- Vulp' al leono diris kun mokrido :
« Al vi naskiĝas nur po unu ido. »
Respondis tiu en fiera ton' :
Nur unu, sed leon' !

A.- Sekvu aliaj fabloj pri vulpo kaj leono. Jen **La vulpo kaj la masko**.

Cl.- La vulp' surkampe maskon trovis,
ĝin ĉiuflanke turnis, ŝovis,
kaj diris kun rikan' acerba :
« Tre bela kapo, sed sencerba. »

A.- La Vulpo kaj la vinbero.

Cl.- Allogis la vinbero, sed estis iom alte.
La vulp' klopodis longe, por ĝin atingi salte,
sed ne sukcesis, lacis, rigardis ĝin, avida,

finfine ŝultrotiris, dirante : « Eh, acida ! »

A.- Leona divido.

Cl.- Foje la lupo kaj la vulpo kaj la kat'
kun la leono sin federis por ĉasad'.
Grandkorpan cervon predis la ĉasanta kvar',
kaj la leono ĝin dividis per deklaro :
« Leono mi estas : Mia la unua parto'.
Plej forta mi estas : Mia do la dua parto'.
La trian rajtas mi : La plej kuraĝa besto',
kaj ve al tiu, kiu tuŝos al la resto' ! »

A.- La cervoj simbolas malforton kaj timon. Jen la fableto **La instruo de la cervino** :

Cl.- Cervino instruis la cervidon :
« Estu kuraĝa, havu fidon
je via forto, kornoj grandaj,
vin ĉiam certe defendantaj.
Hontinde ja, ke vin teruras
la hundoj, kaj vi treble kuras. »
Ekbojis hundoj de proksime,
rifuĝis la cervino time.

A.- Faru kiel mi diras, sed ne kiel mi faras ! povus esti la resumo de tiu ĉi rakonto. Jen meditata fableto : **La aglo kaj la sago**.

Cl.- La aglon murde trafis piko
de sago plumita, kaj li veas :
« Ho jen, mi ne de malamiko,
sed de la propra plumo pereas. »
Popolon falĉas armtekniko,
sed kies manoj do ĝin kreas ?

A.- Kaj jen por fini fableto raportanta pri homoj : **Inter du kverelantoj**.

Cl.- Azenon du friponoj ŝtelis
kaj pri la besto ekkverelis.
Disputon sekvis baldaŭ kria
blasfemo, pugna interdraŝo.
Dum tio ĉi fripono tria
sin ŝtelis for kun la ŝtelaĵo.

A.- Tiuj ĉi simplaj fabletoj multe superas tekstojn de lernolibroj por promenadi en la lernata lingvo. Vortare kaj stile ili metas la gelernantojn en kontakto kun originala materialo, kiun vi neniam trovos en lernolibraj cerbumaĵoj. Ĝuste tiu ĉi kontakto kun facile alireblaj originalaj poemetoj estas bona enkonduko al la studo de la lingvo. Kaj ni ripetos, nur kiam la gelernantoj sentos sin hejme en tiu ĉi lingvaĵo, tiam oni povos komenci provi redoni tiujn ĉi fabletojn en nacilingva traduko. Tro ofte en la fremdlingva instruado gelernantoj devas traduki nacilingven tekstojn, kiujn ili apenaŭ komprenas. El tio la mizero de la rezultoj. Tion ĉi ni nepre evitu en la peresperanta instruado de la verkado en la gepatra lingvo. Tradukoj el

esperanto devas servi al la instruado de la nacia lingvo. Ni parolos pri tio ĉi la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*